



Novjorka Prismo

Numero 138

Novembro 2004

La Esperanto-Societo de Novjorko kore invitas vin al sia novembra kunveno.

DATO: Vendredon, la 19-an de novembro 2004, 6:30-9:00 ptm

LOKO: United Federation of Teachers
50 Broadway, Second floor, Room A, NYC
(between Bowling Green and Exchange Place)

PROGRAMO: 6:30 – Babilado kaj refreŝigaĵoj.

7:00 – Alex Karkovsky prelegos pri
Nekonata Letero de L.L. Zamenhof.

– Maki Sano faros foto-prelegon pri
EKO-Turismo en Suda Svedio.

– Se restas tempo ni eble rigardos 3 DVD-ojn pri Litovio:
Kaunas: Urbo de Kunflo; Litova Kalendaro:
Festoj, Moroj, Tradicioj; Baltmara Sukceno. ★

Protokolo de nia Malfermita Domo, je la 15-a de oktobro 2004

Ĉeestis 10 personoj, inter ili du personoj je la unua fojo: Jesse HEIWA kaj Pilar RAU. Antaŭ la oficiala malfermo de la kunveno, la ĉeestantoj diskutis pri multaj interesaj temoj, inter ili: la multo da dialektoj de la angla; la parolmaniero de la angla en Ĉinio per personoj, kiuj neniam vojaĝis al anglo-parolanta lando; kaj la uzo de Esperanto per personoj, kiuj havas diversajn naskiĝlingvojn, kiuj kunlaboris por kunmeti vortaron de la vaska lingvo.

Je 7:06 ptm, Tomaso ECCARDT oficiale malfermis la kunvenon. Tiu-ĉi kunveno estis nia ĉiu-jara Malfermita Domo, kaj Tom prezentis sin kaj bonvenigis la gastojn. Ĉiu ĉeestanto sin prezentis, unu post la alia, parolante pri kie ili naskiĝis, pri kiam kaj kiel ili komencis lerni Esperanton, pri siaj profesioj, kaj pri aliaj interesaj faktoj pri si.

Je 7:37 ptm, Rochelle F. GROSSMAN deklamis la historion de la patrino de la musoj. La patrino ne havis manĝaĵon por manĝigi siajn infanojn, kaj ŝi ne povis eliri el la mus-truo, ĉar tie estis kato. Do, ŝi bojis kiel hundo, timigante la katon, kaj la kato forkuris. Ŝi poste povis eliri, akiri manĝaĵon, kaj reveni al la truo. Ŝi diris al siaj infanoj, ke tio ĉi montras, ke utilas scipovi paroli alian lingvon.

Je 7:39 ptm, Tomaso anoncis, ke la kurso de Esperanto komenciĝos la venontan semajnfino. Tomaso memorigis nin, ke la kandidata komitato konsistas de Jeff BLAKESLEE, Rochelle F. GROSSMAN kaj Maki SANO. Ili devas kunmeti liston de kandidatoj por la estrarajn postenojn por la ven-

onta jaro. La protokolo estis akceptata.

Je 7:42 ptm, Tomaso parolis pri la origino de Esperanto. La lingvo estis konstruita aŭ inventita de d-ro Zamenhof en la jaro 1887, kaj ĝi ne disvolviĝis el alia lingvo.

Je 7:48 ptm, Semra ĈELIK komencis paroli pri la Internacia Semajnfino de Esperanto, kiu okazis dum la pasinta semajnfino ĉe skiejo Okemo, en la urbeto Ludlow, Vermont. La nova nomo de la evento estos la Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto, kaj venontjare ĝi okazos ĉe la YMCA ĉe Silver Bay, en la urbeto Lake George, Novjorkio. Semra parolis pri la klasoj, pri la prelegoj, pri la diskutrondoj, pri la interkona vespero, pri la internacia vespermanĝo, kaj pri la kultura vespero. Semra esprimis intereson pri la ebleco, ke la klubo aĉetu DVD-on subtitolitan en Esperanto de Tomaso ALEXANDER, unu el la prelegantoj ĉe la evento.

Je 8:04 ptm, Stuart GREEN parolis pri la sukceso de Esperanto, kaj pri la inteligenteco kaj la bonkoreco de personoj, kiuj amas paroli la lingvon.


Je 8:15 ptm, George BAKER parolis pri la bonaj kvalitoj de la lingvo, li montris al la ĉeestantoj ekzemplojn de tradukoj de poezio kaj literaturo en Esperanton, kaj li diskutis pri la traduko de teknikaj terminoj kaj personaj nomoj en Esperanton.

Je 8:24 ptm, la vidbendo pri Esperanto de Steve Allen kaj Bill Harmon montriĝis. Eĉ se tiu ĉi vidbendo nun havas aĝon de pli ol 20 jaroj, ĝi bonege esprimas la kialojn uzi Esperanton kiel lingvo por komuniki inter personoj el diversaj landoj kaj lingvoj.

Je 8:54 ptm, Maki SANO parolis pri diversaj retadreso, kie oni povas trovi informon pri la lingvo, pri la movado, kaj pri multaj aliaj aferoj, kiel Pasporta Servo kaj la Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto.

Je 9:06 ptm, Tomaso fermis la kunvenon. Rochelle donacis al ĉeestantoj la reston de la ĉokoladaj bonbonoj, kiujn ŝi akiris dum sia vojaĝo al Ĉinio. Tuj poste, kvar ĉeestantoj iris al Cafe World. ★

Protokolis: Stuart GREEN



Maki Sano, Jeff Blakeslee, kaj Stuart Green dum la Malfermita Domo.

Artikolo pri la Artikolo

Ni angleparolantoj scipovas uzi la Esperantan difinan artikolon *la*, kiam ĝi estas uzata kiel la artikolo *the* en la angla, t.e., por indiki ion jam menciitan aŭ konatan. Ankaŭ facila por ni estas la uzo de la artikolo por astataŭigi posedajn pronomojn de partoj de la korpo aŭ de vestoj, kvankam iom nekutima en la angla: *Li metis la ĉapelon sur la kapon*. Sed ĉe vortoj abstraktaj aŭ tiuj signifantaj materialojn, la uzo tute diferencas en la du lingvoj. Unu kaŭzo de la diferenco estas tio, ke la angla havas ankaŭ nedifinan artikolon, *a*, *an*, kiu povas esti ellasata por ĝeneraligi la sencon de vorto.

Ni ekzameniu la vorton *pano*. En angla, la vorto *bread*, uzita sen artikolo, signifas nur materialon. Sed en Esperanto *pano* havas du signifojn, nome, la materialon *pano* kaj bulon da *pano*. La kunteksto preskaŭ ĉiam klarigas la ĝustan signifon. Se oni diras en butikoj *Donu al mi panon*, oni scias, ke *bulo* estas intencata. Se oni diras, *Pano estas nutra*, oni scias, ke *materialo* estas intencata. Por nepriigi la materialan sencan, oni povas aldoni la artikolon kaj diri *La pano estas nutra*. Tiam aldonon oni konsilas kun adjektiva epiteto aŭ prepozitivo: *La blanka pano estas preferata de li*; *La pano de tiu butikoj estas ĉiam freŝa*. La kialo de tio ŝajnas esti, ke la adjektivaj esprimoj sugestas individuajn aferojn anstataŭ materialon. En la angla, kompreneble, manko de la nedifina artikolo sufiĉas: *White bread*...; *Bread from that store*... (sed *I'll buy a bread*).

Ni ekzameniu la vortojn *homo* kaj *hundo*. Ili signifas apartan aferon kaj ne ĝeneralan. Sed oni povas fari el ili ĝeneralaĵojn, aldonante la artikolon: *La homo estas mortema*; *La hundo estas la plej bona amiko de la homo*. En la angla, male, oni forigas la nedifinan artikolon: *Man is mortal*; *Dog is man's best friend*.

Ni ekzameniu la abstraktan vorton *filozofio*. En la angla, la vorto *philosophy* signifas nur abstraktaĵon kaj ne iun apartan filozofion. Sed en Esperanto *filozofio* povas signifati ankaŭ tion, kio en la angla estas signifata de *a philosophy*. Tial, por la ĝenerala abstraktaĵo oni diras *la filozofio*. Ĉi tio pli malpli validas por ĉiuj abstraktaj vortoj, por kiuj oni povas koncepti subklasojn, ekzemple *vero*, *bono*, *etiko*, k.t.p. En certaj kunteksto la artikolo povas esti ellasata: *Vero ne bezonas mediti nek spiriti* (Proverbaro), sed oni kutimas uzi ĝin por nepriigi la abstraktan sencan de vorto.

Do multaj materialaj kaj abstraktaj vortoj, kiuj estas uzataj en la angla sen artikolo, bezonas artikolon en Esperanto. La vorto *nature* tradukiĝas kiel *la naturo*, analoge al *la suno* aŭ *la tero*. Sed Esperantaj vortoj finiĝantaj per *-eco*, *-ado*, kaj *-ismo*, ĉar ili kutime signifas abstraktaĵojn, oni povas uzi sen artikolo: *Libereco estas agrabila*; *Promenado estas saniga*. La senco en la aparta kunteksto estas la fina kriterio por uzo aŭ neuzo de la artikolo. Tute ne uzi la artikolon ne estas granda krimo, sed plej bone estas uzi ĝin konsekvence, laŭ la Esperantaj kutimoj. ★

— Maurice WITTENBERG

Societa Kalendaro

Venu al niaj venontaj renkontiĝoj!
Metu tiujn datojn en vian kalendaron.

Novembro 2004

19

ESNY KUNVENO

Nekonata letero de L.L. Zamenhof
Prelego de Alex Karkovsky

EKO-Turismo en Suda Svedio
Foto-prelego de Maki Sano

3 DVD-oj pri Litovio

Vendredon, 6:30 p.m. ĉe UFT

Decembro

5

Tagmanĝo

Dimanĉon, 1:00 p.m. ĉe IBM Plaza

(Limdato por kontribuoj por Prismo 139)

17

ESNY KUNVENO

Vendredon, 6:30 p.m. ĉe UFT

United Federation of Teachers (UFT)

50 Broadway, Second Floor, Room A, NYC
(between Bowling Green and Exchange Place)

"IBM Plaza" Building Atrium

590 Madison Avenue (56th Street) NYC
Street level, in the Atrium

Esperanto en la bibliotekoj!

Helpu nin helpi esperantistojn. Donacu por la kampanjo "Esperanto en la bibliotekoj!"

Lastatempe vi povis legi pri sendado de multaj libro-pakaĵoj al bibliotekoj publikaj kaj de Esperanto-grupoj tra la mondo. La librojn sendas ĉefe Aloisio Sartorato, <ludoviko44@yahoo.com.br>, de la Kultura Kooperativo de Esperantistoj en Brazilo, kaj komisiito de UEA por la kampanjo "Esperanto en la bibliotekoj!". Sed ankaŭ la Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj en Japanujo regule sendas librojn al eksterlandaj bibliotekoj kaj UEA mem sendas kaj SAT-amikaro, ktp.

La sendado estas financata de esperantistoj. En UEA oni sendu sian kontribuon per la kutimaj pag-manieroj al la Fondaĵo Edukado kun la indiko "Bibliotekoj".

Se vi sendas monon al UEA por la Fondaĵo Edukado, bonvolu tion klare mencii sur la pagilo. Pagmanieroj estas troveblaj en Jarlibro de UEA p.33. Unu el la pagmanieroj

estas: Poŝtbankkonto 37 89 64, Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam. IBAN: NL24PSTB0000378964 (kvar nuloj, ne majuskla literoj O) SWIFT: PSTB NL21. Mencion de IBAN kaj SWIFT kodoj permesas senpagan transkontigadon en Eŭropo. ★

— Renato CORSETTI



51 partoprenantoj ĉe la Aŭtuna Semajnfino de Esperanto ĉe Okemo dum oktobro.

IBM Plaza

La 7-an de novembro multege da esperantistoj renkontiĝis ĉe IBM Plaza, tiom, fakte, ke tri tabloj vere ne sufiĉis. Venis tri gastoj, nome Arvydas, nia malnova amiko el Litovio, Chuck Smith, el Pensilvanio, kaj Pilar, nova studentino mia. Ni parolis pri pluraj aferoj, inkluzive la ven-

onta Universala Kongreso, kiu okazos en Vilnius. Ni plejparte bedaŭregis la rezultojn de la lastatempa elektado en Usono, tamen tiom da ĉestantoj gajnis la etoson. ★

— Tom ECCARDT

ESPERANTO-SOCIETO DE NOVJORKO

ĉe UEA, 777 UN Plaza, NY, NY 10017 (212) 687-7041
http://www.geocities.com/esperanto_nyc

Prezidanto
Thomas Eccardt
(212) 477-6516

Korespondanta Sekretariino
Rochelle F. Grossman
(718) 457-1490

Protokolisto
Sruant Green
(631) 751-5683

Vicprezidanto
Thomas Leong
(718) 981-4252

Kasistino
Sofiya Soskina
(914) 813-2495

Program-Direktorino
Maki Sano
(212) 614-9184

Novjorka Prismo

Numero 138 — Novembro 2004
ISSN: 1059-5627

<http://members.aol.com/novjorka/prismo>

Redaktoro
Jim Medrano
(212) 982-5029

Subredaktoroj
Thomas Eccardt
Nancee Medrano

Desegnistino
Mary Pulley

Sendu kontribuojn al:

Jim Medrano, 400 East 20th Street #1B, New York, NY 10009-8103
e-poŝto: medrano@mac.com

© 2004 Esperanto Society of New York